GISTO, MAR,2006.

Georgo Otto Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

ORUMI PILOLON.

Chiuj nepre legu la enkondukan tekston en la februara Esperanto, Vojagxo al Italio. Vera leciono de la italoj, kiel orumi pilolojn. Ech por brazilaj italidoj enestas io lerninda. La bela teksto, far la veterano Sarandrea, estas gxuinda kaj incitas samideanojn kvazau farigxi rabistoj, por havigi al si eblecon flugi al la venonta kongreslando.

LA LASTA VIRINO.

Revene al la premiita kaj multe tradukita verko de Manuel Cofinjo, permesu al mi montri interesan esprimon de la aùtoro:
“En tradukoj nacia al nacia lingvo chiam ekzistas nuanco ne konkerebla, ia koboldo kies rondajn piedojn oni ne povas meti en kvadratajn sxuojn.- Krom tia neredonebla parto, de lingvo-fonto al lingvo-celo ekzistas la esprimmaniero aù, prononco oportuna, kiu aldonas specialan signifon”

El lia GLOSARO:

“La vortoteorio (de Esp°.) ne estas sufiche disvolvigita. Ekzemple: grandbieno, etbieno. “Grandbieno” ne estas simila al granda bieno. **“**Grand” kiel prefikso signifas bieno kvalite diferença pro ties grandeco, dum granda bieno signifas nur bieno kiu estas granda, cele atingi kvalitan diferencon. En la verko mi uzas la esprimon “grandputinido” En la senso de granda putinido, sed ja la de putinido kvalite diferença, kun speciala diferenciga kvalito.”

Aldone: tiuj ekzemploj atentigas nin, por pli gxuste kompreni tekstojn.

KARNAVALO/FERIOTEMPO

Jen klarigo, kial la VERDA KAFO meritis la cheeston de rekorde pokaj fidelaj kompanoj. Mi esperas ke chiuj Gistoj enposxtigitaj atingis la adresatojn

ANTAÙSAVILO

Kontraù seksaj infektigxoj, kontraù senvola gravedigxo, Chini inventis nevideblan, likvan substancon Gxi baldaù povos surmerkatigxi ankaù en nia lando. La Preso komentas, ke gxi estas nano-teknologio kaj avertas ke plena garantio pri la sekureco ankoraù ne estas. Jen do plia helpo por ke ventkapuloj ne plensxtopu la mondon per malsanaj malsatuloj.

INTERESA VERKETO.

Chu vi jam legis KIAL VIROJ SEKSUMAS KAJ INOJ AMUMAS? – Jen tre interesa rezonado kiu surprizos same virojn kiel virinojn, pro faktoj de li kaj sxi jam konstatitaj dum la chiutaga vivo sed ne serioze konsideritaj. Ekzemple: Vi veturigas aùton enurbe kondukante vian edzinon, por viziti amikan familion. Nur sxi scias la vojon tien, tial sxi indikas al vi “antaùen, turnu dekstren, turnu liven”. Tutcerte sxi ofte misdiros dekstren (aù liven) kaj baldaù poste sxi korektas sxian indikon (ofte tro malfrue!) Simila testo: supozu ke vi staras sur la strato Independência kaj rigardas al

la konstruajxo kie situas nia kunsidejoTutty's. La tasko estas:indiku la direkton al la geografia Okcidento (Nebezone difini laù gradoj, sufichu per la mano montri la direkton) Inter dek cheestantaj inoj eble nur du indikos la -gxustan direkton – Provu nun! – Nenio kontraù virinoj aù kontrau viroj. La aùtoroj Allan kaj Barbara Pease elstarigas la diferencojn inter la du seksoj surbaze de genetikaj studojoj. La libro celas montri la naturajn diferencojn inter viro kaj virino kaj objektivas estigi plenan komprenon inter ambaù seksoj por ke paroj toleru sin reciproke, ne nur dum amindumado. Laù mi la verko devus esti legita de chiu, chu fraùlo chu fraùlino antaù ol serioze pensi pri dumviva kunvivado sub sama tegmento. Mi memorigas tion kion iam skribis Paulo Sant'ana (ZH) nacilingve"De dia só amores, de noite maus odores"(suprajxe) = Dumtage nur senfina amoro, vespere korprema doloro.

PILOTI FORNON.

Imageblas ke inter la Gisto-legantoj tre. pokaj homoj iam uzis aù nun uzas ligno-bruligan fornon.Bonstataj homoj kutimas posedi eksterurban bieneton kun domo kaj kelkaj dombestoj. La somera varmego finigxas kaj varma akvo en vintro chiam bonvenas.. Sur bieneto la vento provizas brulsxtofon, faligante branchojn aù tutajn arbojn. Ankaù pro oldigxo de arboj, ne mankas brulligno. Tial lignobruliga forno ege estigas komforton. Daùre disponeblas varmakvo por la chimarono, teo aù rapide farenda kafo kiam vizitanto(j) alvenis. Kiu volas investi iom pli, tiu instaligas akvovarmigan sistemon. Nun, iom pri la gxusta manipulado de la forno, por ke gxi ne sufoku la hejmanojn per fumo. Kondiche ke la kamentubo estu sufiche longa (alta), sufichas munti ekfajrigan stakon el malnova papero, iom da bambu –splitoj plus, tre sekaj branchetoj kaj aliaj facile bruligeblaj lignajxoj. Por chendi (permesu la neologismon) la fajron la aperturo al la kamentubo estu tute malferma kaj la aeroenlaso estu duonmalferma gxis la kamentubo varmigxis. Tiam, kaj post kiam oni aldonas iom da pli dikaj sxtipoj, oni povas rapide fermi la kamentubon. Tiu manovro celas ke la amaso da varma gaso/aero kiu ankoraù ne eligxis, tiru la fumon kaj varmon chirkaù la interna bakforno. Oni aldonu lignosxtipojn prefere tra la ronda aperturo kiu ituas super la brulejo, en la fera plato, (ne tro malfrue!), dum restas suficha kvanto da bragxoj kiuj ekbruligos la nove enmetitan.lignajxon Pli poste oni povas Fermi la hamentubon. Kiam la forno havas multajn bragxojn, ne plu bezonatas aperturo al la kamentubo. Oni povas fermi gxin 100%. Do gxuu la komforton!

KURIOZAJXO.

Interesa testo indikas, vian psikologian karakteron, chu viran aù inan plus vian gradon de trompigxemo, laù la aùtoroj Allan kaj Barbara Pease: Akurate alrigardu la subajn figurojn kaj, sen laúte diri kion vi vidas, ie skribu vian opinion, por poste kompari gxin kun la ceteraj kompanoj Se gxis la venonta Gisto.vi ne akiris la antaùe menciitan libron, vi ekscios la rezulton.

Kion vi vidas?